# *Indepaz denuncas novan murdon de socia gvidanto en Antioquia, Kolombio*





**Foto:Twitter / @AlejoToroAnt**

Bogoto,  apr 4 (RHK) La Kolombia Instituto pri Disvolvi?o kaj Pacaj Studoj (Indepaz) denuncis la murdon de komunuma estro John Jairo Valencia Soto, en evento okazinta la 30-an de marto en la nordokcidenta departemento Antioquia.

La neregistara organizo (NRO) indikis en deklaro publikigita ?i-lunde en sia tvitera konto, ke Valencia Soto estis murdita en la sektoro konata kiel El Buey, kiu situas inter la vila?o El Cauzal kaj La Victoria, kampara areo de ?la municipo de Abjorral, Antioquia.

Indepaz, kiu menciis, ke pli da detaloj de la evento estas nekonataj, atentigis, ke kun ?i tiu murdo estas 37 sociaj gvidantoj murditaj en la sudamerika lando en 2023.

Valencia Soto funkciis kiel konsilisto por la municipo de Abejorral kaj estis parto de la lasta kampanjo por la prezidanteco kun la reganta Partio  PaKto Historia.

La krimo anka? estis denuncita de diversaj sociaj sektoroj, inkluzive de la NRO Tablo de Homaj Rajtoj de Oriento kaj Alejo Toro, reprezentanto ?e la ?ambro por Antioquia de la Historia Pakto.

"Mi volas esprimi mian kondolencon al la familio kaj amikoj de Jhon Jairo Valencia Soto, kunlaboranto de la kampanjo Petro Presidente en Abjorral, kun kiu mi havis la ?ancon kundividi dum mia vizito al la municipo", diris la le?donanto.

Fonto: Telesur

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/318680-indepaz-denuncas-novan-murdon-de-socia-gvidanto-en-antioquia-kolombio

**Radio Habana Cuba**